

PENSEO

N-ro 247

majo / 2012

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 23-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

Imre Szabó (Hungarujo)



Amareta

La somero disŝirita en amaretajn melodiojn
tra fluejoj de valoj ondas al foroj,
en kumuloj pli-pli grandaj nigras erco radianta,
ĝi emisias ankoraŭ abundkreskan fabeleton,
en ĝia ĝangalo ni perdiĝos baldaŭ,
kuntiriĝe ni klinos la kapon demandsigne
sur la genuojn kaŭrtiritajn.

La steloj frapas veziketojn
batante akran randon
en la lagon de nigro.

Nur la memoroj kuras fortoperde,
ĉio cetera rigidas, kiel la
en-momenton-frostinta,
la granda eterna vireco sur alto de pinto
surhavanta poreterne la frostintan flagon:
momenton de sia plezuro.

Nur la ĝardeno de via koro apertas,
eĉ la suno ĝin vizitas por revarmiĝi,
pompo verdanta ĉirkaŭgirlandas
pendante abunde al la glacio,
ho, kiel belas, kiam per siaj birdoj ekkantaj
ĉielen eksplodas via amo je mia veno.

Ĉe vi banas sin mia animo,
skuante siajn perlojn, kiel mil birdoj.
Inter miaj eksmodaj ludiloj
mi elektadas-selektadas
emante trovi la plej belan —
kaj per abrupta movo
mi donacas ilin ĉiujn al vi,

kaj ankaŭ mi intersidiĝas.



Anteo (Ĉinujo)



la granda muro

— funebre pri infano dispremita

la drako de dek mil lioj
beligas la landon dum miloj da jaroj.
sub la piedoj feraj
ĝi estas serpento senspina.
hazardaj staroj dependas de sango
kaj karno interfrate trompaj kaj mortigaj.
vakse memblokiĝas la okuloj kaj oreloj;
la korpo ĝuas flugon en sia ventrego.
la putraj intestoj
nutras la kapon pajlan.
oscedado de opio kromedzinojn orgasmigas.
oro kaj amoro senigas la koron.
maljunuloj mensogemaj
komplotas kun blankaj formikoj.
la radoj bonhavaj
prenas la korpon de infanoj por ekspresa
aŭtovojo.
homoj kaj bestoj sur la gardoturo
sin kaŝas en fumon.
la nebulo anesteza
gustumigas mortan karnavalon.
vivuoj resonas
laŭ la kurbo brila.
patrinoj gravedaj je lumbrikoj
kun plezuro perfortita

serĉas nigrulojn kaj blankulojn
ekster la muro brika.
la flava DNA
variacias en nitrata acido bolanta.



Stanislaw Rynduch (Germanujo)



Por mia damo

Mia floreto

Multaj floroj bonodoras,
nur la unu por mi floras.
Ĝi estas tre specifika,
Tre bonkora, romantika.

Tutan vivon ĝin serĉinta,
mi postrestis disrevita.
Ĝin mi serĉis eksterlande
Kaj ĝi estis ja enlande !

Ekkoninte multajn florojn,
komparante la odorojn,
nun mi scias kiu ĝusta,
kiu vera, kiu justa.

En Patrujo ĝi ja floras,
Min vidante plikoloras,
Ŝpruĉas per kolor' kaj amo ;
Por la kor' pura balzamo.

Nun ĉe mia vivo-fino
trovis mi veran animon.
Do, mi haltu ĝin kun amo,
Estu ŝi amata damo !

En aprilo 2012



Paŭlo Silas (Brazilo)



ANTAŬENIRANTA ARDO KAJ ARTO

La Ard' ide-batalis kontraŭ Arto:
Bestaron krakmaĉos verda herbo,
Stomakon malsatigos la manĝado;
Fajrer', je malvarm', senigos neĝon.

Ĝis fino vin forviŝos Tempo-vermo.
La Filo englutos sian Patron,
Trembrilos l' utileco de l' Eterno;
La Tuton simpligos nepra Parto.

Sub kiun vivocelon vi submetos
De l' homoj malsimilaj la sekretojn?
Demandis la Art' al Kontraŭanto.

Sekretojn mi denttranĉos senreziste.
Timiga respond' al la demando!
Vin!, Arton, mi sklavigos senhezite.

Cezar (Germanujo)



Sangotango

Sur sinkinta karavelo
ludas laŭte la kapelo.
Ili ludas rangan tangon,
sangan tangon sur la vrak'.

Langa tango,
slanga lango;
ranga slango,
sanga tango.

Sanga lango,
tanga vango.
Sanga tango
pro la rang'.

Sur sinkinta karavelo

ludas laŭte la kapelo.
Ili ludas rangan tangon,
sangan tangon sur la vrak'.



Mori (Usono)



KOLOMBOJ

En ajna momento
nia terglobo bela
povas transformiĝi
al nia komuna TOMBO
pro la eksplodo
de granda atoma bombo!


Pri la sorto de l' lupoj
hommienaj,
kaj vulpoj
homvizaĝaj
kiuj konsideras
l' ceterajn homojn;
la ŝafoj
mi ja ne multe zorgas!
sed mi ja zorgas pri
la vivo de la pacamaj
kolomboj!

*

Ĉu jam ne estas tempo
por la forigo de l'
atomaj bomboj ?



Leieladonna (Meksikio)



EL ĈIUJ KOLOROJ ESTAS LA NOKTO

El tutaj koloroj estas la nokto...
tiu ĉi nokto kiu ankaŭ atendas...
sed matene kaj vespere
ankaŭ atendas...
ĉar kvar jaroj antaŭe estis diferenca
ĝoja, prospera, kun espero...
Ĉi tie, kvar jaroj antaŭe...
la urbo neniam dormis ,
sed nun ni atendas por esti
la sama, feliĉa, prospera kaj paca
la gastama aŭ hospitala
sed ankoraŭ la ombroj reĝas...
Tamen mi scias...
ke jam baldaŭ venos la lumo
Kaj mi eĉ jam dankas al Dio
Ĉar mi scias ke ni reprenos denove
tiujn valorojn kiujn kelkaj el ni
forĝesis.



Jadranka Miric (Serbujo)



Mi konvinkos vin

Mi konvinkos vin
ke post pluvo
ne plu estos suno.
Nek ĉiu birdo
al sia aro alflugos.
Mi konvinkos vin
ke hormontriloj kaŭze
de milito, ne haltigos.
Eĉ floroj ne floros

ĉar la suno estingōs.
Mi konvinku facile vin
sed kiel konvinkiĝos mi
ke mi pace plu vivos
en ĉi tiu malpleneco
depost vi!

Amnaskiĝo

El cindro
sur brulrestaĵo
de grandaj amoj
naskiĝas la etaj,
ĉar animo ne laciĝas
en koro post ŝtormo
trankvilo nestiĝas.
Dum ia novdolĉa sento
komencas loĝi ,
nova enspiro kiel vento
spiritigas animon,
ĉar animo emas ami,
manoj karesi,
okuloj rigardi.
Tial lasu vian koron
ke mi trankviligu,
viajn manojn
ke mi varmigu,
lasu kantojn kanti,
metu miajn lipojn
sur dolĉajn viajn.

Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



Raviĝo

Sorĉa plenluno kaŝita
Sub envuala mister'
Ŝajnas virina vizio,
Ĉe mezepoka fenestr'
De nevidebla kastel'.

Juiz de Fora, 10/03/2012



Lenke Szász (Rumanujo)



VIVEMO

Tra fendeto de asfalto
Ekaperis eta planto:
Sub la krusto sufokiga
Planta semo restis viva.
Ĝojigas min ekapero
De la vivo el la tero.



Ferreira Gullar (1930--)



Kampula trajneto

Ekiras trajn' kun infano,
jam iras vivo en gir',
kuniras destin', kompano,
kaj urbo kaj nokt' en rondir'.

Kuriras trajno sencele
renkonte de tagonov',
tra kampoj iras sinpele,
sur montoj anhele, sub freŝa marbl'ov'.

Surmonte siblas dum brilas lunhel',
nun kure flugas tra stela ĉiel',
lunhel', ĉiel', kaj stel'.

**Versoj speciale verkitaj de brazila F.Gullar por
konata tokato komponita de brazila Heitor
Villa-Lobos.*

Elportugaligis



Ŭel (Brazilo)

Wisława Szymborska (1923-2012)



Ĉi tie

Mi ne scias ie,
sed ĉi tie, sur la Tero, ĉio abundas.
Oni ĉi produktas seĝojn kaj ĉagrenojn,
tondilojn, vjolojn, tristecojn, tranzistorojn,
grandajn digojn, ŝercojn, kaj tetasojn.

Eble aliloke estas pli da ĉio,
Kaj iakaŭze mankas nur pentraĵoj,
kineskopoj, torteloj, tuketoj por larmoj.

Ĉi tie multnombros lokoj kun ĉirkaŭaĵoj.
Kelkiujn vi povas aparte ekami,
nomi ilin laŭplaĉe,
kaj gardi kontraŭ malbono.

Eble ie estas lokoj similaj,
sed neniu ilin opinias belaj.

Eble ialoke, sed ne plurloke,
vi tie trovos torson apartan,
kaj kun ĝi adekvatajn ilojn,
por, al alies infanoj aldoni la proprajn,
krome la manojn, la piedojn kaj miroplenan
kapon.

La nesci' ĉi tie estas laborplena,
senĉese kalkulas, komparas, mezuras,
eltiras kub-radikojn kaj konkludojn.

Mi scias, scias, kion vi pensas,
ĉi tie nenio longdaŭras,
ĉar de ĉiam por ĉiam regata de l'elementoj.
Sed, vidu – la elementoj laciĝas facile
Kaj de temp' al tempo devas longe ripozi
ĝis la sekva fojo.

Kaj mi scias, kion vi pensas ankoraŭ.
Militoj, militoj, militoj.
Sed ankaŭ inter ili okazas la paŭzoj.
Atentu ! – la homoj estas malbonaj.
Ripozu ! – la homoj estas bonaj.
Je „atentu“ oni konstruas dezertejojn.
Je „ripozu“ oni kun ŝvit' konstruas domojn
Kaj oni loĝas ene haste.

La vivo sur la ter' estas sufiĉe ĉipa.
Por songoj ekzemple vi pagas eĉ ne groŝon.
Por iluzioj – nur kiam perditaj.
Por posedi la korpon – nur per la korpo.

Kaj kvazaŭ ĉi ĉio malmultus,
vi rondiras senbilete en planet-karuselo,
kaj kun ĝi, tutgape, en galaksiaj ŝtormoj,
en tempoj tiel vertiĝodonaj,
ke ĉi tie, sur la Tero eĉ ektermos nenio.

Nu, alrigardu bone :
la tablo staras, kie staris.
Sur ĝi la folio, samkiel antaŭe,
tra la fenestr' etaperta blovetas l'aero,
en la vandoj neniam teruraj fendoj,
tra kiujn vi estus nenien forblovita.

El la pola esperantigis



Helena Tylipska (Italujo)

Ĉineske

Vejdo (Ĉinujo)



En flora maro

—laŭ ĉineska skemo Niannujiao*
kolza kampo
ondadas
sub sunlumo ora

en aero
 plenplenas
 aromo la flora
 zum' abela
 oreĵplaĉas
 en vent' favora
 mi ebrias
 ĝis la fundo kora

ĉu l' natur' precipe
 ja dorlotas nin
 per valora
 belartaĵo
 aŭ l' tero
 per fekund' fervora
 naskas tian
 buntecon veran?
 al kolora
 mond' mi kultas
 kun sento adora

**Niannujiao (Ĉarma kantistino): ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 11 versoj de 436, 436,445,46 / 654,436,454,46 silaboj, laŭ rimaranĝo xxa, xxa,xxa,xa (x = senrima)*

Benjamenon Kraŭs (Usono)



Malhavo


—laŭ ĉineska skemo Dekses-Silabo*

vin'
 kun la patro kaj patrin'
 nesamas
 sen mia avin'

ŝi
 kiel hela galaksi'
 lumadas
 en mia konsci'

stel'
 forĝata per belanĝel'
 ĵus falis
 el nokta ĉiel'

**Dekses-Silabo (ĉine: Shiliuziling): ĉina fiksforma poemo el kvar versoj de 1, 7, 35 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa (x=senrima)*



Sero (Ĉinio)

Feliĉeco estas papilio

—laŭ ĉineska skemo Fendieer*

Feliĉeco estas papilio.
 Ĝi flirtas
 en vario
 nefore,
 se ĉasas
 kun pasio
 vi jen por
 kapti sen premio.

Tamen en la kvietaj medio,
 sidiĝas
 sen anksio
 vi pace,
 ĝi falas
 per flug-skio
 jen sur vin
 en ĝoja ebrio.

**Fendieer (papilio): ĉina fiksforma poemo el du samaj strofoj kun po 8 versoj de 10,34,334,36 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,xxa,xa (x=senrima)*



Lily (Ĉinujo)

Hazarda kuniĝo

—laŭ ĉineska skemo Busuanzi*

I.

hazarde ĉe roj'
bruna forta vir'
baris al mi la vojon
kun flata admir'

li mian jupon
prenis per man-tir'
kaj vokis mian nomon
jen je mia mir'

II.

li ŝajnis amik'
svage en memor'
sed aspektis avide
je ina favor'

mi laŭte kriis
en komenca hor'
kaj trankvile obeis
pro lia fervor'

III.

bruske brakumis
li min senvorte
enkore mi suspiris
aj, malbonsorte!

tuj liaj brust' min
tuŝis komforte
kaj lia erekta kac'
tiklas min forte

IV.

miajn mamojn li
knedis karese
kisis miajn orelojn
ade senĉese

liaj lipoj ja

frotis imprese
sur miaj vangoj varmaj
kaj tre sukcese

V.

jen mi kolapsis
kun disfala sent'
mi lin kaptis je korpo
kun kora konsent'

la sango bolis
sub virseksa tent'
deziro al amoro
jame en ferment'

VI.

li kuŝigis min
nudigis min jen
sur la herba tapiŝ' ni
tordiĝis sen ĝen'

mi ĝoje ĝemis
sub lia kis-ĉen'
de mampint' ĝis intergamb'
per langa promen'

VII.

mi tordis korpon
sub lia lang-lud'
mi sentis la moviĝon
de l' kap'de testud'

ĝi tre rigidis
per forta altrud'
ĝi serĉis mian truon
per enŝova krud'

VIII.

fontis mia suk'
per glita fluo
ĝi jam alproksimiĝis
al mia truo

mi jam ekstazis
 kun korpa skuo
 petis ĝian eniron
 por gea ĝuo

IX.

fine ĝi glate
 en min jam glitis
 la birdo profundiĝis
 min tre ekscitis

ĝi fojrafoje
 piste vizitis
 mian kaŝejon ĝoje
 eĉ ne hezitis

X.

mi laŭte ĝemis
 ĉe la lud-kulmin'
 li ejakulis forte
 en mia vagin'

tre elĉerpite
 ni kuŝiĝis nin
 ankoraŭ anhelante
 en stulta fascin'

**Busuanzi (aŭguristo): ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun po kvar versoj de 55,75 silaboj kun duona rimo.*

Maupassant (1850-1893)



DIVORCO

Moŝto Bontrano, la famkonata Parizana advokato, tiu kiu de antaŭ dek jaroj pledas, kaj obtenas ĉiujn separojn inter geedzoj malbone pariĝintaj, malfermis la pordon de sia studejo, kaj lasis lokon, por ke la nova kliento povu eniri.

Li estis ruĝa dikulo, kun blondaj kaj malmolaj vangharoj, barelventra, sangriĉa kaj fortika viro. Li salutis:

– Bonvolu sidiĝi, diris la advokato.

La kliento sidiĝis, kaj tusinte:

– Mi venas por peti vin, sinjoro, pledi por mi en afero de eksedziĝo.

– Parolu, sinjoro, mi aŭskultas vin.

– Sinjoro, mi estas eksnotario.

– Jam!

– Jes, jam. Mi aĝas tridek sep jarojn.

– Daŭrigu.

– Sinjoro, mi faris malfeliĉan edziĝon, tre malfeliĉan.

– Vi ne estas la sola.

– Tion mi scias, kaj mi kompatas la aliajn; sed mia kazo estas entute speciala, kaj la naturo de miaj plendmotivoj kontraŭ mia edzino tre aparta. Sed mi ekas per la komenco. La maniero je kiu mi edziĝis estas tre bizara. Ĉu vi kredas al la danĝeraj ideoj?

– Kion vi volas diri?

– Ĉu vi kredas, ke iuj ideoj estas tiel danĝeraj al iuj spiritoj, kiel la veneno al la korpo?

– Sed, jes, eble.

– Certe. Estas ideoj, kiuj eniras en nin, rongas nin, mortigas nin, frenezigas nin, kiam ni ne scias kontraŭstari ilin. Tio estas speco de kancero de la animoj. Se ni malbonŝanciĝus lasi unu el tiuj pensoj enŝoviĝi en nin, se ni ne rimarkus ekde la komenco, ke ĝi estas invadanto, amorantino, tirano, ke ĝi etendiĝas horon post horo, tagon post tago, ke ĝi senĉese revenas, instaligas, forpelas ĉiujn niajn kutimajn absorbajn zorgojn, absorbas nian tutan atenton, kaj ŝanĝas nian juĝkapablon, ni estas perditaj.

Jen do, tio kio okazis al mi, sinjoro. Kiel mi ĵus diris al vi, mi estis notario en Rueno, kaj mi estis iom senmona, ne malriĉulo, sed malriĉuleto, sed malsereneta, devigita al konstanta ŝparado, trudpelita limigi ĉiujn miajn gustojn, jes, ĉiujn! kaj tio estas

malfacila je mia aĝo.

Estante notario, mi legadis tre atente la anoncojn sur la kvaraj paĝoj de la gazetoj, la ofertojn kaj la mendojn, la malgrandajn korespondaĵojn, ktp., ktp.; kaj plurfoje mi sukcesis, dank'al tiu rimedo, aranĝi por kelkaj klientoj avantaĝajn geedziĝojn.

Iun tagon, mi trafis jenan anoncon:

"Beleta fraŭlino, bonedukita, tre bonmaniera, edziniĝus kun honorinda viro, kaj alportus al li du milionoj kvincent mil frankojn tute netajn. Nenion el la agentejoj."

Nu, ĝuste, tiun tagon, mi vespermanĝis kun du amikoj, proceduristo kaj ŝpinmastro. Mi ne scias kiel nia konversacio ektemis pri la geedziĝoj, sed, mi ridante parolis al ili de la fraŭlino kaj ŝiaj du milionoj kvincent mil frankojn.

La ŝpinmastro diris: "Kiaj do estas tiuj virinoj?"

La proceduristo jam vidis plurfoje bonegajn geedziĝojn priraktitajn en tiuj kondiĉoj, kaj li donis detalojn; poste, sin turnante al mi, li aldiris:

– Diable, kial vi ne esplorus la aferon por vi mem? Du milionoj kvincent mil frankojn, evidentas, tio forigus ĉiujn viajn zorgojn.)

Ni ekridis ĉiuj tri, kaj oni parolis pri alia afero.

Unu horon poste, mi revenis hejmen.

Ĉinokte malvarmis. Cetere mi loĝis en malnova domo, unu el tiuj malnovaj provincaj domoj, kiuj similas al fungejoj. Metante la manon sur la feran apogrelon de la ŝtuparo, frosta tremeto penetris en mian brakon, kaj dum mi etendis la alian por trovi la muron, tuŝante ĝin, mi sentis duan tremeton invadi min, pli malsekan tiu ĉi, kaj ambaŭ kuniĝis en mia brusto, plenigis min de angoro, malgacejo kaj nervozeco. Kaj, ekkaptita de subita memoro, mi murmuris:

– Je la diablo, se mi havus tiujn du milionoj kvincent mil!

Mia dormoĉambro estis veaspekta, ĉambro

de Ruena fraŭlo, prizorgadita de servistino, ankaŭ komisiita de la preparado de la manĝaĵoj. Tiu ĉambro, de tie ĉi vi povas imagi ĝian priskribon! granda lito sen kurtenoj, ŝranko, komodo, tualetejo, ne stovo. Vestajoj sur la seĝoj, surplanke paperoj. Mi ekkantetis, laŭ ario de koncertkafejo, ĉar iafoje mi vizitas tiujn lokojn:

Deŭ millions [Du milionoj]

Deŭ millions, [Du milionoj,]

Sont bons [Estas bonaj]

Avec cinq cent mille [Kun kvincent mil]

Et femme gentille. [Kaj ĉarma edzino.]

Fakte, mi ankoraŭ ne konsideris tiun virinon, kaj subite enŝoviĝante en mian liton, mi pensis pri ŝi. Mi tiom pensis pri ŝi, ke mi ekdormis nur post longa tempo.

La postan tagon, antaŭ la tagiĝo, malfermante la okulojn, mi memorigis, ke mi devas troviĝi je la oka en Darnétal [Darnetal] pro grava afero. Do necesis, ke mi ellitiĝu je la sesa, kaj frostis.

– Diablo el diabloj, la du milionoj kvincent mil!

Ĉirkaŭ la deka matene, mi revenis al mia notariejo. Ene estis odoro de ruĝvarmigita stovo, malnovaj paperoj, la odoro de la ekdifektiĝantaj proceduraj paperoj – nenio fetoras tiom –, kaj odoro de aktistoj, botoj, redingotoj, ĉemizoj, haroj kaj haŭto, vintra haŭto malmulte lavita, la tuto varmigita je dek ok gradoj.

Mi tagmanĝis, kiel ĉiutage, brulgustan kotleton, kaj pecon da fromaĝo. Poste mi relaboris.

Tiam, unuafoje, mi tre serioze pensis pri la fraŭlino kaj al ŝiaj du milionoj kvincent mil frankojn. Kiu ŝi estis? Kial ne skribi? Kial ne kontentigi mian scivolemon?

Fine, sinjoro, mi mallongigas mian rakonton. Dum du semajnoj, tiu ideo hantis min, obsedis min, turmentis min. Ĉiuj miaj malagrablajoj, ĉiuj malgrandaj malplezuroj, kiujn mi senĉese suferis, ne rimarkante ilin ĝis

nun, preskaŭ ne konsciante ilin, nuntempe pikis min kvazaŭ kudrilpikoj, kaj ĉiu el tiuj malgrandaj suferadoj tuj pensigis min pri la fraŭlino kaj ŝiaj du milionoj kvincent mil.

Mi finis imagi ŝian tutan historion. Kiam ni deziras ion, sinjoro, ni imagas ĝin, tiel kiel ni esperas ĝin.

Jes ja, ne estis tre laŭnature, ke juna fraŭlino el respektata familio, dotita per tiel taŭga maniero, serĉu edzon per la vojo de la gazetoj. Tamen, povus montriĝi, ke tiu fraŭlino estus honorinda kaj malfeliĉa.

Unue, tiu financa situacio je du milionoj kvincent mil frankoj ne mirigis min, kiel feina afero. Ni kutimas, ni la legantoj de ĉiuj ofertoj de tiu naturo, al edziĝinaj proponoj akompanitaj de ses, ok, dek aŭ eĉ dek du milionoj. La sumo de dek du milionoj estas eĉ sufiĉe komuna, ĝi plaĉas. Mi ja scias, ke ni ne multe kredas al la realeco de tiuj promesoj. Tamen ili enirigis en nian spiriton tiujn fantastajn nombrojn, verŝajnigas, ĝis ia grado, por nia neatenta kredemo, la mirindegajn sumojn, kiujn ili simbolas, kaj inklinigas nin konsideri doton je du milionoj kvincent mil frankoj kiel tre ebla, tre morala.

Do, fraŭlino, eksteredzeca infano de parvenuo kaj ĉambristino, neatendite heredinte de sia patro, samtempe sciiĝis pri la makulo de sia naskiĝo, kaj por ne riveli tiun ĉi al iu viro, kiu amus ŝin, alvokis la nekonatulojn per rimedo tre uzata, kiu kuntenis mem specon de konfeso de hereda difekto.

Mia supozo estis stulta. Tamen mi inklinis al ĝi. Ni la notarioj, neniam ni devus legi romanojn, kaj mi legis plurajn, sinjoro.

Do mi skribis, kiel notario, en la nomo de kliento, kaj mi atendis.

Kvin tagojn pliposte, ĉirkaŭ la tria vespere, mi estis laboranta en mia studejo, kiam la aktestro anoncis al mi:

– Fraŭlino Kantofrizo.

– Enirigu.

Tiam aperis virino, kiu aĝis ĉirkaŭ tridek

jarojn, iom dika, bruna, kun la mieno embarasa.

– Sidigu vin, fraŭlino.

Ŝi sidiĝis kaj murmuris:

– Estas mi, sinjoro.

– Sed, fraŭlino, mi ne havas la honoron koni vin.

– La persono al kiu vi skribis.

– Pri geedziĝo, ĉu?

– Jes, sinjoro.

– Ha! Bonege!

– Mi venis mem, ĉar persone ni pli bone faras la aferojn.

– Mi tute konsentas kun vi, fraŭlino. Do vi deziras edziĝini, ĉu?

– Jes, sinjoro.

– Ĉu vi havas familion?

Ŝi hezitis, mallevis la okulojn, kaj balbutis:

– Ne, sinjoro... Mia patrino... kaj mia patro... estas mortintaj.

Mi ekremetis. – Do mi trafe divenis – kaj forta simpatio subite vekigis en mia koro por tiu kompatinda estaĵo. Mi ne insistis, por domaĝi ŝian sentemecon, kaj mi reparolis:

– Ĉu via financa situacio estas tute neta?

Ĉifoje, ŝi nehezitante respondis:

– Ho! jes, sinjoro.

Mi rigardis al ŝi kun granda atento, kaj vere, ŝi ne malplaĉis al mi, kvankam iom matura, pli maturaĝa ol mi imagis al mi. Ŝi estis bela kaj granda ulino, vigla virino. Kaj la ideo alvenis al mi, ludi al ŝi beletan etan komedion de sentoj, amsopiriĝi al ŝi, anstataŭigi mian imagan klienton, post kiam mi estos certa, ke la doto ne estas iluzia. Mi parolis al ŝi pri tiu kliento, kiun mi priskribis kiel malgaja viro, tre honorinda, iom malsana.

Ŝi rapide diris:

– Ho! sinjoro, mi amas la bonfartajn ulojn.

– Cetere, vi vidos lin, fraŭlino, sed nur post tri aŭ kvar tagoj, ĉar hieraŭ li forveturis al Anglio.

– Ho! tio estas teda, ŝi diris.

– Dio mia! jes kaj ne. Ĉu urĝas al vi reveni hejmen?

– Tute ne.

– Nu, restu ĉi tie. Mi klopodos por pasigi al vi la tempon.

– Vi estas tro afabla, sinjoro.

– Ĉu vi loĝis en hotelo?

Ŝi nomis la ĉefan hotelon de Rueno.

– Nu, fraŭlino, ĉu vi volas permesi al via estonta... notario, ke li vespere ofertu al vi la vespermanĝon.

Maltrankvila, nedecidema, ŝi ŝajnis heziti, poste ŝi sin decidis:

– Jes, sinjoro.

– Je la sepa, mi pasos al via hotelo por forkonduki vin.

– Jes, sinjoro.

– Tiam, ĝis la vespero, fraŭlino!

– Jes, sinjoro.

Kaj mi rekondukis ŝin ĝis mia pordo.

Je la sepa mi estis al la hotelo. Ŝi faris elspezojn de tualetoj por mi, kaj akceptis min per tre koketa maniero.

Mi forkondukis ŝin vespermanĝi en restoracion, en kiu mi estis konata, kaj mendis sensallogan menuon.

Unu horon pliposte, ni tre amikiĝis, kaj ŝi rakontis al mi sian historion. Filino de granda sinjorino logita de nobelo, ŝi estis edukita de gekamparuloj. Nun ŝi estis riĉa, ĉar ŝi heredis gravajn monsumojn de sia patro kaj sia patrino, kies nomojn ŝi neniam malkaŝos, neniam. Pri iliaj nomoj, estis vane demandi ŝin pri ili, estas senutile petegi ŝin diri ilin, ĉar neniam ŝi malkaŝos ilin. Ĉar mi ne tro volis koni ilin, mi pridemandis al ŝi koncerne ŝian riĉecon. Ŝi tuj parolis pri ĝi kiel sperta virino, memfida, certa pri la ciferoj, la valorpapiroj, la enspezoj, la interezoj kaj la investadoj. Ŝia kompetenteco en tiu materio, tuj donis al mi grandan fidon al ŝi, kaj mi fariĝis galanta, kun tamen rezervo, sed mi klare montris al ŝi, ke mi havis guston por ŝi.

Ŝi sprite flirtis, ne sen gracieco. Mi ofertis

al ŝi ĉampanon, kaj mi trinkis kun ŝi, tiu kiu malklarigis miajn ideojn. Tiam mi klare sentis, ke mi estis amindumonta, kaj mi timis, timis pri mi kaj ŝi, mi timis ke ŝi ankaŭ estis iom emociata, kaj estis cedonta al mi. Por kvietigi min, mi denove parolis al ŝi pri ŝia doto, kiun necesus kalkuli per preciza maniero, ĉar mia kliento estis aferisto.

Ŝi gaje respondis:

– Ho! mi scias. Mi kunportis ĉiujn pruvojn.

– Ĉu ĉi tie, en Rueno?

– Jes, en Rueno.

– Ĉu vi havas ilin al la hotelo?

– Sed jes.

– Ĉu povas montri ilin al mi?

– Sed jes.

– Tiun vesperon, ĉu?

– Sed jes.

Efektive, ŝi kunportis ĉiujn siajn valorpapirojn. Mi ne povis dubi, mi tenis ilin, mi palpis ilin, mi legis ilin. Tio metis tian ĝojon en mian koron, ke tuj violenta deziro ekkaptis min, ke mi kisu ŝin. Mi komprenas min, temis pri ĉasta deziro, deziro de homo kontenta. Kaj, ja, mi kisis ŝin. Unu fojo, du fojoj, dek fojoj... tiel, ke... la ĉampano helpante... mi cedis al tento... aŭ prefere... ne... ŝi cedis.

Ha! sinjoro, post tio, kian kapon mi havis... kaj ŝi do! Ŝi ploris kiel fontano, petigante min, ke mi ne perfidu ŝin, ke mi ne misfamigu ŝin. Mi promesis ĉion, kion ŝi volis, kaj mi foriris kun terura spiritostato.

Kion fari? Mi trompis mian klientinon. Ne estus grave, se mi havus klienton por ŝi, sed mi ne havis. La kliento estis mi, la naiva kliento, la trompita kliento, trompita de si mem. Kia situacio! Mi povis forlasi ŝin, estas vere. Sed la doto, la bela doto, la bona, palpebla, certa doto! Kaj ĉu mi rajtis forlasi ŝin, la kompatindan fraŭlinon, post mi surprize trompis ŝin? Sed, poste, kiom da maltrankviloj!

Kiom da fidelo oni povus atendi de edzino, kiu tiel facile cedas je tento!

Mi trapasis teruran nokton de hezito, turmentata per memriproĉoj, freneziga pro timoj, balanciĝanta per ĉiuj skrupuloj. Sed, matene, mia racio klariĝis. Mi vestiĝis elegante, kaj dum la dek-unua sonis, mi prezentiĝis al la hotelo, en kiu ŝi loĝis.

Vidante min, ŝi ruĝiĝis ĝis la okuloj.

Mi diris al ŝi:

– Fraŭlino, por kompensi miajn damaĝojn, mi havas plu nur farendajon. Mi petas vian manon.

Ŝi balbutis:

– Mi donas ĝin al vi.

Mi edziĝis kun ŝi.

Ĉio iris glate dum ses monatoj.

Mi koncesiis mian notariejon, mi vivis kiel rentulo, kaj vere mi ne havis riproĉon, eĉ ne unu por fari al mia edzino.

Tamen mi rimarkis iom post iom, ke de tempo al tempo, ŝi longe eliris. Tio okazis je determinita tago, unu semajnon estis marde, la alian semajnon vendrede. Mi kredis min trompita, kaj mi sekvis ŝin.

Tio okazis iun mardon. Ŝi piede eliris ĉirkaŭ la unua vespere, malsupreniris la straton de Respubliko, deskre turniris, uzis la straton laŭlonge de la arkiepiskopan palacon, poste la straton Granda-Ponto ĝis Sejno, laŭiris la kajon ĝis la ponto Petro, trapasis la riveron. Tiam, ŝi ŝajnis maltrankvila, sin turnante ofte, gvatante ĉiujn pasantojn.

Ĉar mi maskovestis min kiel karbisto, ŝi ne rekonis min.

Fine, ŝi eniris en la stacidomon de la maldekstra riverbordo; mi ne plu dubis, ŝia amoranto tuj alvenos per la trajno je la unua kaj kvardek kvin.

Mi kaŝiĝis malantaŭ kamiono, kaj mi atendis. Fajfiloblovo... fluo da vojaĝantoj... Ŝi antaŭeniras, impetas, ekkaptas enbrake etan knabinon je trijaraĝa, kiun dika kamparulino akompanas, kaj pasie kisas ŝin. Poste ŝi sin

turnas, ekvidas alian infanon, pli junan, knabinon aŭ knabon, portitan de alia kamparulino, impetis sur ĝi, violente brakumas ĝin, kaj foriras, eskortata de la du bubetoj kaj la du servistinoj, al la longa, malluma kaj dezerta promenejo de Cours-la-Reine [Korso-la-Reĝino].

Mi revenis hejmen konsternata, la spirito angorplena, komprenante kaj ne komprenante, ne kuraĝante diveni.

Kiam ŝi revenis por la vespermanĝo, mi impetegis al ŝi, hurlante:

– Kiuj estas tiuj infanoj?

– Kiuj infanoj?

– Tiujn, kiujn vi atendis al la trajno de Saint-Sever! [Sankta-Sever]

Ŝi eligis kriegon kaj svenis. Kiam ŝi rekonsciigis, ŝi konfesis al mi, en deluvo de larmoj, ke ŝi havis kvar infanojn. Jes, sinjoro, du knabinojn kiujn ŝi vidis la mardon, kaj du knabojn la vendredon.

Kaj tio estis – kia honto! – tio estis la origino de ŝia riĉeco. – La kvar patroj!... Ŝi amasigis sian doton.

Nun, sinjoro, kion vi konsilas al mi?

Kun graveco, la advokato respondis:

– Oficiale adopti la infanojn, sinjoro!...

Je la 21a de februaro 1888

elfrancigis



Noël Lecomte (Francujo)

Eldonas Redakcio de **Penseo**
Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)
Adreso: No.-3-2 de la 5-a etaĝdomo
de No. 19, Wujiang St., Jiangbei Distrikto,
Chongqing, 400020, Ĉinio

Tel: (023) 67095890 (hejme)

Retadreso: vejdo@163.com

Ĉiujn kontribuojn al la ĉefredaktoro.

Por legi pasintajn numerojn de Penseo, vin turnu al www.elperno.cn/penlisto.htm aŭ

<http://gazetejo.org/eo/penseo>

◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇